

LETTER IN LA BRITA ESPERANTISTO, official journal of the British Esperanto Association, issue of March/April 1986, written in Esperanto by Giorgio Silfer, English translation by Dr Iain S. Palin.

ESPERANTO IN IRAN: THE ROLE OF BAHÁ'ISM

In the last two numbers for the year 1985 of *La Brita Esperantisto*, the Baha'i World Faith is mentioned twice: in connection with the review by William Auld of the biography of Wendy Hiller dedicated to Lidia Zamenhof, and in the course of the essay *Esperanto-shock and counter-shock*, an historical sketch of the Esperanto Movement in Iran. The author of this last is unnamed, but *Heroldo de Esperanto* indicates the name of Miss Shirin Ahmad-Nia (No. 1745, p. 4, 25-4-1985).

On the subject of the review I congratulate my colleague Auld and associate myself with his concluding hope for a work that merits success.

The essay about Esperanto in Iran needs a slightly longer commentary.

It is true that Lidia Zamenhof wrote the appropriate text for *Persia* in the *Encyclopaedia of Esperanto*. Parenthetically, a pedant could point out that the title of paragraph, *1910-1935: After the Constitutional Revolution in Iran*, is somewhat nonsensical, for the charming land of Omar Khayyam was never called Iran in the period under discussion - the decree for the establishing of the new name was dated 22.11.1935, and it remained in force until 1949, when both names were officially put on an equal footing.

It is a pity that in the paragraph under discussion, the author does not refer to the most important events linking Persia with the history of Esperanto: the spread of the language among the Baha'is, and the support of Persia for the League of Nations resolution favourable to the International Language. The *Encyclopaedia* cited above reported on the first, and Edmond Privat, who was a member of the Persian delegation at Geneva, reported on the second. The spread among the Baha'is calls to mind that of Esperanto in Oomoto (*) at almost the same time. Europe also knew such phenomena - in Catalonia in the mid-1930's the Esperanto Movement was almost completely tied to the ideals of anarchism. Lidia Zamenhof reported that in Persia, if any European declared himself as being an Esperantist, the intellectuals at once commented **So you are a Baha'!** The contribution of the Baha'is to the progress of Esperanto was not just quantitative, but also qualitative; almost all learning texts for Persians including a very suitable dictionary, were prepared by Baha'is - the author is silent about this. We owe entirely to Baha'i Persians the making known of Iran to many Esperantists; the non-Baha'is who contributed to the creation of the Persian facet of Esperanto culture were not simply non- Iranians, but Europeans (George Cox, C. M. Bean, Edmond Privat, and above all Gaston Waringhien). The author is also silent about this.

The elements just mentioned clarify the forbidding of Esperanto by the last Iranian dynasty. Not so much the 'too enthusiastic Baha'is' as the real fact that the International Language penetrated Persia by two means; not so much the behaviour of a few (as is usually the case with those persecuted, Baha'is are generally very, even too, discreet) as the attitude of the monarchy opposed to free contacts with foreigners; not so much local circumstances as the general situation in Islamic lands, closed tight against contacts outside their own cultural sphere (even **The Noble Qur'an** [La Nobla Korano] was not translated from Arabic or Persian but from Italian!).

The essay, despite the double mention of the word 'shock', leaves aside the greatest shock which struck the Esperantists of Iran, namely the persecution and killing of a number of Baha'is and Esperantists, about whom the traditional periodicals (primarily the organ of the UEA (**)) were consistently silent. In fact in the world of Esperanto, only two important magazines broke this silence: **Literatura Foiro** in 1981, and **Monato** somewhat later.

As a person 'sitting in Europe' I most certainly am living through the events in Iran differently from the Esperantists there, to whom I sincerely wish much success; but because one Esperantist there chooses to give her version of the facts to others 'sitting in Europe', allow me, according to European custom, to make an essential contribution to an objective survey of the history of Esperanto in Persia.

Giorgio Silfer, Europe.

(*) **Oomoto**: A religious philosophy offering world teachings, based in Buddhism and originating in Japan. (I.S.P.)

(**) **UEA**: Universala Esperanto-Asocio, the world organization for Esperantists. (I.S.P.)

La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST
ELDONAJO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

82.024A Jaro, N-Ro 869

Marto-Aprilo 1986

Eldonas:
ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF. Tel. 01-727-7821

Redaktoro:
WILLIAM AULD
20 Harviestoun Road. DOLLAR, Skotlando FK 14 7HG.

LAŬ MIA OPINIO . . .

Esperanto en Irano: la rolo de bahaismo

En la du lastaj numeroj de *La Brita Esperantisto* de la jaro 1985 la Monda Bahaa Kredo estas menciita du fojojn: okaze de recenzo de William Auld pri la biografia libro de Wendy Heller, dediĉita al Lidja Zamenhof, kaj ene de la eseo *Esperanto-ŝoko kaj kontraŭ-ŝoko*, historia skizo de la Esperanto-Movado en Irano. La aŭtoro de ĉi-lasta estas anonima, sed "Heroldo de Esperanto" indikas la nomon de F-ino Ŝirin Ahmad-nis (n-ro 1745, p. 4, 1985 04 25).

Pri la recenzo mi gratulas kolegon Auld, kaj mi aliĝas al lia konkluda espero por sukcesomerta verko.

La eseo pri Esperanto en Irano bezonas iom pli longan komenton.

Ĝuste Lidja Zamenhof verkis la koncernan tekston pri *Persujo* en la *Enciklopedio de Esperanto*. Parenteze, pedantulo povus prave rimarkigi ke la paragrafa titolo: *1910-1935: Post la Konstitucia Revolucio en Irano* estas iom sensenca, ĉar la ĉarma lando de Umar Kajjam neniam nomiĝis Irano en la konsiderata periodo – la dekreto por la alprenado de la nova nomo datiĝas 1935 03 22, kaj ĝi validis ĝis 1949, kiam ambaŭ nomoj estis samrange oficialigitaj.

Estas domaĝe ke en la preparolata paragrafo la aŭtoro ne aludas la du plej gravajn eventojn kiuj ligas Persion al la historio de Esperanto: la disvastiĝo de la lingvo inter la bahaanoj kaj la apogo de Persio al la rezolucio de Ligo de Nacioj favora al la internacia lingvo. Pri la unua raportas la *Enciklopedio* supre citita, pri la dua raportas Edmond Privat, kiu estis membro de la persa delegacio en Genevo. La disvastiĝo inter la bahaanoj rememorigas tiun de Esperanto ĉe Oomoto, preskaŭ samepoka: ankaŭ Eŭropo konis tiajn fenomenojn – en Katalunio meze de la 1930aj jaroj la E-Movado estis preskaŭ komplete ligita al la anarkiismaj idealoj. Lidja Zamenhof raportas ke en Persio, se iu

eŭropano deklaris sian esperantistecon, la intelektuloj tuj rimarkis: "Do vi estas bahaano!". La kontribuo de la bahaanoj al la progreso de Esperanto estis ne nur kvanta, sed ankaŭ kvalita: preskaŭ ĉiuj lerniloj por persoj, inkluzive de tre taŭga vortaro, estis verkitaj de bahaanoj – pri tio la aŭtoro silentas. Ni ŝuldas ekskluzive al bahaaj persoj la konatiĝon pri Irano ĉe multaj esperantistoj; la nebahaanoj kiuj kontribuis al la kreo de persa faceto en la Esperanto-kulturo eĉ estis neirananoj, sed eŭropanoj (George Cox, C. M. Bean, Edmond Privat kaj, precipe, Gaston Waringhien). Ankaŭ pri tio la aŭtoro silentas.

La ĵus menciitaj elementoj klarigas la malpermeson kontraŭ Esperanto fare de la lasta irana dinastio. Ne tiom la "tro entuziasmaj bahaanoj" kiom la reala fakto ke la internacia lingvo penetris Persion tra tiu medio; ne tiom la sinteno de kelkaj (kutimante je persekutoj, bahaanoj estas ĝenerale tre, eĉ tro, diskretaj homoj) kiom la sinteno de monarkio, kontraŭa al liberaj kontaktoj kun eksterlandanoj; ne tiom loka cirkonstanco, kiom la ĝenerala situacio de islamaj landoj, ege fermitaj al kontaktoj ekster sia kultura sfero (eĉ *La Nobla Korano* ne estis tradukita de arabo, aŭ persa, sed de italo!).

La eseo, malgraŭ la duobla mencio de la vorto "ŝoko", preterlases la plej gravan ŝokon kiu trafis la esperantistaron en Irano: nome la persekuton kaj la mortigon de pluraj bahaanoj kaj esperantistoj, pri kiuj la tradiciaj periodaĵoj (unuavice la organo de UEA) sisteme silentis. En Esperantujo fakte nur du gravaj gazetoj rompis tiun silenton: *Literatura Foiro* en 1981, kaj *Monato* pli malfrue.

Kiel persono "sidanta en Eŭropo" tute certe mi travivas alimaniere la eventojn en Irano, ol la ticaj esperantistoj, al kiuj mi sincere deziras multe da sukceso; sed ĉar unu tiea esperantist(in)o bonvolas rakonti sian version pri la faktoj al aliaj homoj "sidantaj en Eŭropo", permesu ke, laŭ eŭropaj kutimoj, mialportu

132

kontribuan esencan por objektiva transigardo de la historio de Esperanto en Persio.

Giorgio Silfer, Eŭropo